



# aktuala

## 35-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkredo 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; [ebg.skynetblogs.be](http://ebg.skynetblogs.be); [xurb.freehostia.com](http://xurb.freehostia.com); [esperanto.net](http://esperanto.net); [le.rnu.net](http://le.rnu.net); [uea.org](http://uea.org); [liberafolio.org](http://liberafolio.org); [eo.eventeo.net](http://eo.eventeo.net); [sites.google.com/site/ebgaktuala](http://sites.google.com/site/ebgaktuala); [sites.google.com/site/panb2001](http://sites.google.com/site/panb2001)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 1 - Esperantaj Eventoj, Nia Zamenhof-festo, Prezidanto Tostas
- Paĝo 2 - Miloj da Eŭroj Fraŭditaj en IEI Internacia Esperanto-Instituto
- Paĝo 6 - Arabaj Noveloj; Camoens, Moĵaev, Bronŝtejn, Garcia Orive
- Paĝo 8 - Prezidanto pri Z-Jubileo; Ĉinaj novaĵoj de Augusto 分发作业
- Paĝo 10 - 6a Azia Kongreso, Somera Esperanto-Studado
- Paĝo 11 - Beneluksa Kongreso kaj Mirakloj en Irano
- Paĝo 12 - Libera Folio pri lingvoj kaj Jevgenij Gaus pri Google kaj Lernu
- Paĝo 12 - Hju Rid sin demandas ĉu Esperanto estas parazito

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Januaro 2010

- 13 Eddy Raats pri vojaĵoj en Kubo
- 20 Bernard-Regis Larue pri Saturno Majstro de la Ringoj
- 27 Franz Meul, LVS Antverpeno pri Kuba Socio: Impreso de Vojaĝo Junia 2008

### Februaro 2010

- 3 Barbara Poterucha pri nia sano
- 10 Eddy Raats pri vivo en Kubo
- 17 Semajna kunveno
- 24 Sebastjan Kirf prelegas pri Diplomblaborado kaj Bona Espero

### Marto 2009

- 3 Semajna kunveno
- 10 Semajna kunveno
- 17 Semajna kunveno
- 24 Semajna kunveno
- 31 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

## ESPERANTAJ EVENTOJ



Belga Esperantista Fervojiata Asocio, kunvenas ĉiu merkredo tagmeze en Centra Stacidomo de Bruselo ĉe fervojsista kunvenejo (Birdino fotis)

## EBG - NIA ZAMENHOF-FESTO



Ankoraŭ estis plena sukceso ĉi-jare. La homoj ekalvenis ĉirkaŭ la 11a kaj duono kaj la festejo rapide pleniĝis. La retrovoj kaj novaj renkontoj aranĝiĝis ĉirkaŭ kuba aperitivo kaj malvarma bufedo riĉa el diversspecaj pladoj. La tempo por bone plenigi niajn stomakojn kaj la skeĉoj alternis por la plej alta plezuro de niaj oreloj. Por bone evidentigi la festan temon, la georganizantoj invitis la prezidenton Kastro mem por gajigi kaj aranĝi la tagon.

Niaj novaj grupanoj animis la unuan skeĉon, temis pri iu familio kiu kverletis antaŭ la televidilo kie oni diskutis pri la venonta kuba kongreso. Poste, oni vidis iun drakon kiu volis manĝi ĉiujn Esperantistojn. Sed dank'al la spektantoj, ĝi fine akceptis gluti la tutan enhavon de la fridujo. Tuj post ĝia eliro, iu pola amiko, Mariusz MAJEWSKI, iomete prelegis pri la volo de sia esperanta grupo en Varsovio,

refreŝigi la tombon de la bopatro de Zamenhof, S-ro Zilbernik kiu estis la unua grava mecenato de la Esperanto-movado. La lasta skeĉo montris Zamenhof mem kiu, por momento ricevis permeson de la paradiestraro reveni sur Teron por renkonti nin, la Esperantistojn kaj ekscii tion kio sia internacia lingvo iĝis. Por li, oni kantis iomete false sed certe plenkore. Sed, la plej elstara el la tago estis, sen neni dubo, la spektaklo (one man show) de la itala komediisto, Mario MIGGLIUCCI, kiu rakontis la plej gravaj okazaĵoj el la vivo de Zamenhof. Lia profesia ludo (aktorado) ekkaptis la atenton de la publiko.

La festo finiĝis per bona kafo kaj parto de grandega kuko. Tamen, la kafo estis kafo, sed la kuko estis vera artaĵo. Ĝi estis tia bona por manĝi kia bela por foti. La kukbakisto supre desegnis, per ĉokolado, la vizaĝon de Zamenhof.

Ni ne povas ĉesigi tiun raporton sen gratuli ĉiuj kiuj partoprenis al la sukceso de tiu festo; tiuj multaj kiuj plenumis unu aŭ alian taskon, kaj tiuj, multe malpli nombraj, kiuj klopodis por ke, ankoraŭ tiu ĉi jaro, ĉio bone funkciu...

PS : Tamen, mi demandas al mi ĉu tio estus okazinta tiel bone sen tiu malgranda mentfolio kiun mi enmetis en la rumon de ĉiu aperitiva glaso ??? Lucien Michaux

## PREZIDANTO NOVJARE TOSTAS

Karaj kuntostantoj al la postjubea nova jaro!

Ni tostas hodiaŭ al nia dokumenta lingvo. Kiam (la en 2009 jubileinta) Lazaro Ludoviko Zamenhof kunmarŝis kun ni sur la valon de la homa egaldigno en 1887, li kreis dokumentan lingvon. Ĝian ĉifron vi povas paki en absurde malpezan broŝureton, en 'ŝlosilon'. Se vi volas, vi povas eĉ sendi dokumenton al homo, kiu ne lernos la lingvon, sed nur devos deĉifri



per sialingva ŝlosilo vian dokumenton. Hodiaŭ ni tostas al nia monumenta lingvo. Kiam (la en 2009 kunjubileinta) Ivo Lapenna grimpis por ni la monton de Montevideo en 1954, la movado gvidata de li sentis la bezonon prui sian lingvon kapabla konstrui monumentojn, kapabla ĉiufake funkcii same delikate, same precize, kiel aliaj kandidatoj por la rolo de interŝtata lingvo.

Ni hodiaŭ tostas al lingvo, kiu laboras ponte inter tiuj du skaloj. Neniu lingvo malpli supla povus porti tiel delikatan devaron, ekde simpla dokumenteco, pere de majesta monumenteco, ĝis la respondeco ponti inter la simplemo kaj la majestemo.

Tostas ni hodiaŭ al tiuj, kies inspireco faris el la lingvo personan spertaron disdirendan ankaŭ al tiuj niaj najbaroj, kiuj ne lernis ĝin. UEA lanĉas por la ekanta jardeko Projekton Vizaĝoj ( ne malplej per tiu ĉi mesaĝo) kiu spronu vin verki dokumentojn, skulpti monumentojn, por diskonatigi krom Zamenhof kaj Lapenna ankaŭ la multajn prirakontindajn vizaĝojn de la Esperanta mondo. "Vivos eterne pri ili memor" nur se aperos pri ili materialo biografia (aŭ, se vi preferas, viv-libr-a) vikipedie, foirbude, volumege, broŝurete, do en la tuta bunto de nia repertuaro. Lande, fake, loke, eĉ eksterasocie, kunvizaĝumu kun ni!

Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA  
Gazetaraj Komunikoj de UEA, N.355, 2010-01-01



Belgaj partoprenantoj en IF Nördlingen, Bavario



Litovoj ĉiuj inaj inter la 150 gepartoprenantoj

### MILOJ DA EŬROJ FRAŬDITAJ

Miloj da eŭroj senpure malaperis el la banka konto de Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, rakontas bone informitaj fontoj. La estraro de IEI laŭ la samaj fontoj longe ne konsciis pri la liko en la konto, ĉar al ĝi estis prezentataj falsaj konteltiroj. Reprezentantoj de IEI ne respondas al mesaĝoj pri la asertata fraŭdo. Same ne respondas demandojn Atilio Orellana Rojas, la direktoro de IEI, kiu estis urĝe devigita forlasi sian postenon kaj sian loĝejon en la konstruaĵo de IEI.

Internacia Esperanto-Instituto estas malnova kaj finance solida institucio, fondita en la jaro 1930 de Andreo Cseh, la aŭtoro de la Cseh-metodo por instruado de Esperanto, kaj ges-roj Isbrücker.

IEI pli frue posedis du domojn en Hago, Nederlando. Antaŭ deko da jaroj la instituto vendis unu el la domoj kaj tiel

havigis al si kapitalon (kvankam bonan parton utiligis je la funda renovigo de la restanta, la IEI-domo). El tiu ĉi ili luigas nun parton, kaj tio donas konstantan enspezon.

Pro diversaj donacoj kaj heredaĵoj IEI havas financon bonhavan, per kiu ĝi interalie kunfinancas la eksterordinaran katedron pri Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo. Lastatempe montriĝis tamen, ke mono de donacintoj en neplanita maniero malaperadis el bankkonto de IEI.

Laŭ informoj kolektitaj de Libera Folio, la estraro de Internacia Esperanto-Instituto en Hago dum longa tempo nenion sciis pri la malaperado de mono, ĉar al la estraro estis prezentitaj falsaj konteltiroj.



Unua foto: Estraro: Prezidanto E. Borsboom; Kasisto E. Burg; Sekretario C.A. Bos Tehnologio Toon Witkam; Membro P. A. Buijsters. Dua foto: Sidejo: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat, 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando, Telefono +31 70 3556677, Faksno +31 70 3584422, iesperanto @ versatel.nl. Tria foto: Eksa direktoro: Atilio Orellana Rojas



La likado de mono povis daŭri dum relative longa tempo, ĝis la komenco de oktobro, kiam unu el la estraranoj decidis

kontroli la bonhavan de la konto memstare, rekte alirante la retejon de la banko. Tiam evidentiĝis, ke iu kun aliro al la ŝlosilvortoj de la reta banko eluzis sian pozicion kaj elprenis plurajn milojn da eŭroj el la kapitalo de IEI.

La 6-an de oktobro la direktoro de IEI, Atilio Orellana Rojas, kiu dum pli ol dek jaroj laboris en la instituto, estis subite eksigita el sia posteno. En la retejo de IEI aperis lakona informo: "Atilio Orellana Rojas ekde la 6-a de oktobro 2009 ne plu laboras ĉe IEI." En komunikado poste sendita al kelkaj Esperanto-gazetoj, la estraro de IEI abunde dankas aliajn kunlaborintojn. Pri la direktoro, kiu dum pli ol dek jaroj laboris ĉe la instituto, la komunikado konstata nur, ke li "ne plu laboras ĉe IEI".

La 28-an de oktobro, tri semajnojn post la okazaĵo, Libera Folio turnis sin al la estraro de IEI por ekscii kial la direktoro de la instituto forlasis sian postenon. Ĝis nun venis nenia respondo. Informoj ricevitaj de Libera Folio el alia fonto sugestas, ke reprezentantoj de IEI subskribis juran sindevigon ne komuniki ion ajn pri la kaŭzoj de la eksigo.

La eventuala jura sindevigo povus rilati al la fakto, ke la eksa direktoro de IEI konsentis forlasi antaŭ la 1-a de decembro sian loĝejon, kiun li ĝis tiam tre favore luis en la domo de IEI. Laŭ la nederlanda juro, forigo de luanto kontraŭ ties volo estas tre komplika kaj ofte tute ne ebla. Simile malfacila cetere estas reciproka interkonsento. Libera Folio la 12-an de decembro skribis al pluraj aktivaj retpoŝtaj adresoj de Atilio Orellana Rojas por peti lin rakonti, kial li subite forlasis sian postenon kaj sian loĝejon ĉe IEI, kaj ĉu lia foriro iel rilatas al la malkovro de monmanko en la kontoj de IEI. Neniu respondo alvenis ĝis nun.

La tutan artikolon vi povas legi ĉe <http://www.liberafolio.org/> - kie vi povas aldoni ankaŭ vian personan komenton. Retejo de IEI vi trovos tie: <http://www.iei.nl/>. Fonto: Esperanto-Centro Eventoj en Budapeŝto, <http://www.eventoj.hu>. Vidu ankaŭ paĝo 2 de Aktuala 4/2009.

### ESTRARO DE IEI

**Prezidanto** E. Borsboom ; **Kasisto** P. A. Buijnsters ; **Sekretario** C.A. Bos ; **Tehnologio** Toon Witkam.

Ed Borsboom (1936) studis germanistikon kaj instruis tiun lingvon en la altlernejo de Utrecht ĝis la emeritiĝo en 1999. Li lernis Esperanton en 1951, helpis dum siaj liberaj horoj en la Internacia Esperanto-Instituto ĉe Andreo Cseh, aktivis en TEJO kaj fariĝis ŝtata traduktisto por Esperanto. En 1976 aperis lia biografio 'Vivo de Lanti'. Dum la 80-aj jaroj li ĉiusomere donis kursojn pri literaturo en La Chaux-de-Fonds ĉe Claude Gacond kaj ekde la 90-aj jaroj en Kvinpetalo ĉe Suzanne Bourot kaj Georges Lagrange. En 1984 li editoris 66 kolumnojn de Cseh 'Vortoj de Andreo Cseh'. Post 20 jaroj en la redakta stabo de 'Literatura Foiro' li nun okupas sin i.a. pri taskoj en 'La Gazeto' gvidata de Eugène kaj Lena de Zilah kaj depost 1995 prezidas la estraron de Internacia Esperanto-Instituto.

Toon Witkam (1944) post studado ĉe la Tehnika Universitato en Delft (Nederlando) eniris la softvar-industrion kiel programisto. Specialiĝinte pri perkomputila lingvistiko, li en ĉ. 1982 esperantiĝis kaj iniciatis DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado, esplorprojekton en kiu Esperanto rolis kiel interlingvo). Dum la 1990-aj jaroj li konsilis la Eŭropan Komisionon pri aŭtomata tradukado, laboris kiel gast-esploristo en Japanio kaj estis partotempa profesoro pri informadiko (kogna ergonomio de homa-komputila

interfaco) en Delft. Emeritiĝinte post 2001, li nun konstruadas Esperantan vortstatistikan kaj tekstanalizan softvaron. Li estas membro de GIL (Gesellschaft für InterLinguistik, Berlino) kaj estrarano de IEI ekde 2007.

Kees (Cornelis Adriaan) Bos (1940) estas pensiita konsilisto kaj universitata docento pri urboplanado. Li esperantiĝis en 1986. Ano de la eksa Utrehta Esperantista Rondo kaj nuntempe de la regiona klubo Utrecht. Partoprenis diversajn Universalajn Kongresojn (Roterdamo, Prago, Berlino, Vilno, Roterdamo). Ekde 2003 estrarano de IEI. Okupiĝis speciale pri la renovigo de la Andreo Cseh-Domo kaj fariĝis pro tio en 2007 Honora Kunlaboranto.

Piet Buijnsters (1941) laboris dum naŭ jaroj ĉe Philips kiel komputilprogramisto kaj sistemanalizisto. Li poste studis psihologion (licenciulo/magistro pri entreprena psihologio) kaj dum dudek jaroj estis (kaj diversfoje ankoraŭ estas) docento kaj konsilanto pri entreprena direktado por estraj profesioj en hospitaloj. Li ankaŭ faris diversajn komputiajn programojn por la instruado kaj por sanzorgaj profesioj. Esperantisto li estas depost 1956. Dum multaj jaroj li estis estrarano de la E-klubo de Eindhoven kaj nun estas prezidanto de la E-klubo de Nimego (Nijmegen). Li kelkfoje partoprenis Universalajn Kongresojn, i.a. Helsinki, Antverpeno, Roterdamo kaj ankaŭ diversajn regionajn kunvenojn. Li okupiĝas pri tradukado. Ĉe FEL estis eldonita lia traduko de 'La morto en Venecio' de Thomas Mann. Lia intereso nun speciale estas edukaj kaj instruaj sistemoj kaj traduksistemoj. Krome speciale lia intereso estas la lingvoproblemo en la Eŭropa Unio kaj kiel Esperanto kaj IEI povas alpaŝi al tiu problemo.

5

6

### ARABAJ NOVELOJ (7a-13a jarcentoj)

#### NOVELETO 6

Muhammad bin Abdi-l-Maliki-l-Hamdaniĵ raportis, ke...Ahmad bin Tulun iam estis manĝanta sidante en unu el siaj ĝardenoj. Li ekvidis almozulon vestitan per ĉifonaĵoj. Li kaptis panbulon, kokinaĵon, kokidaĵon, viandajn pecojn, kaj ordonis al unu el la servistoj, ke li donacu tion ĉion al la almozulo. Revenis la servisto kaj raportis, ke tiu ne akceptis la donacon. Tiam, diris Ibnu Tulun al la servisto: « Alkonduku lin al mi. » Kaj li aperigis la almozulon antaŭ li. Li pridemandis lin. Tiu konvene respondis, kaj tute ne konfuziĝis pro la impona teniĝo de sia pridemandanto, kiu fine diris al li: « « Montru al mi la dokumentojn, kiujn vi kunportas, kaj diru sincere kiun taskis vin, ĉar certas por mi, ke vi estas spiono. » Kaj li aportigis la vipojn. La homo agnoskis la faktojn. Iu ĉe la spektantaro diris: « Jen, pro dio, la magio mem! » Ahmad respondis: « Ne magio, sed valida rezonado. Mi rimarkis la mizeron de ĉi tiu. Mi antaŭmetis al li pladojn tiajn, ke eĉ satinto ilin glutemus. Ili tute ne plezurigis lin, kaj li ne tuŝis ilin. Mi venigis lin al mi. Li tenis sin antaŭ mi kun fortika memfido. Kiam mi vidis lian mizerulan vestaĉon kaj lian firman koron mi komprenis, ke li estas spiono ».

#### NOVELETO 7

Abu Muhammad al-Kuraŝij rakontis al mi jenon: Iu konfidis monon al aliulo kaj poste ĝin postulis de la sama. Ĉi tiu forĵetis la postulon. Tiam, la unua submetis la pridisputon al Ijas bin Mu'avijato (kvazaŭ-mita heroo de la abbaso periodo, mortis ĉirkaŭ 739, kadi de Basrato aŭ Bassora, kiun la tiama literaturo prezentas kiel specon de Salomono). La plendanto diris: « Mi ja konfidis la monon al li ». La kadi (juĝisto, juristoficisto, aŭtoritatulo, religia juĝisto): « Kiu ĉeestis? » La plendanto: « Mi transdonis la monon al li en tia-tia loko, en nenies akompano. » La kadi: « Kaj kio videblas surloke? » Li respondis: « Unu arbo ». La kadi: « Tuj kuru al tiu loko kaj rigardu la arbon. Eble Allaho [Alaho] la

Tre-Alta manifestos tie al vi ajnon, kio evidentigos vian rajton. Eble vi enterigis vian monon sub la arbo kaj forgesis tion, kaj rigardante la arbon vi tion rememorigos. » La homo foriris. Tiam, Ijas diris al la kulpigato: « Sidiĝu ĝis kiam via kontraŭulo revenos. » Li tiel faris, dum Ijas prizorgis siajn juĝistajn aferojn kaj lin intermite rigardis. Iom poste li diris al li: « He, vi, ĉu vi pensas, ke via kamarado jam atingis la lokon de la arbo, kiun li menciis? » Li respondis: « Ne. » « Malamiko de Allaho! Vi estas ja perfidulo! » Li diris: « Pardonu min! ». « Pardonu vin Allaho! » La kadi ordonis ke oni lin gardu ĝis la reveno de la homo. Al kiu, kiam li revenis, Ijas diris: « Li agnoskis vian rajton. Vi povas postuli ĝin de li. »

#### NOVELETO 8

Certa homo konfidis monon al aliulo, honesta intendanto, laŭdire. La deponanto foriris al Makkato [Mekko]. Reveninte, li postulis ĝin kaj la alia rifuzis [redoni la deponaĵon]. Tiam, li iris al Ijas bin Mu'avijato, kaj rakontis al li sian ĉagrenon. Ijas demandis al li: « Ĉu li sciigas pri via veno al mi? » Li respondis: « Ne. » Ijas: « Ĉu vi denuncis lin al aliulo? » « Ne, neniu scias ajnon pri tio. » Ijas diris: « Foriru, kaj gardu kaŝata vian aferon; kaj revenu al mi post du tagoj. » La homo foriris. Tiam, kunvokis Ijas la koncernan intendanton, kaj diris al li: « Multe da mono ĵus alvenis, kaj mi deziras transloki ĝin en vian domon. Ĉu via domo tutfidindas? » Li respondis: « Jes. » Li diris: « Pretigu lokon por la mono kaj tasku fidindulojn por porti ĝin. » La deponanto revenis al Ijas, kiu al li diris: « Iru al lia homo kaj postulu de li vian monon. Se li ĝin redonas al vi, jen kio finigas la aferon; se li neas, diru al li: 'Mi sciigos pri tio la kadi-on' ». La homo iris vidi la deponprenanton, kaj diris al li: « Mian monon! Se ne, mi tuj iros al la kadi kaj sciigos lin pri mia afero! » Tiam, li redonis al li ties monon. La homo iris al Ijas, kaj diris: « Li donis al mi la monon. » Poste, prezentiĝis la intendanto al la rendevuo kun Ijas; ĉi tiu severe riproĉis kaj skoldis lin, kaj diris: « Ne plu proksimiĝu al mi, perfidulo! ».

Jacob Hasbun, membro de EBG, tradukis



## POEMARO:

### SONETO

Jakob sep jarojn al paŝista vago  
ĉe l' patro, de Raĥel, Laban, sin bridis;  
sed ne pro li, pro ŝi li sin decidis,  
ĉar ŝin li celis dum la tuta ago

La tagojn li pro unu sola tago  
pasigis, ĝoja nur, ke li ŝin vidis,  
sed antaŭzorge l' patro lin perfidis,  
kaj estis Lea, ne Raĥel, la pago.

Vidinte triste, ke ĉi trompaj faroj  
al li la paŝtistinon ne permesos,  
kvazaŭ li ŝin ne indus post l' aktivo,

li sin ekbridis dum sep pliaj jaroj,  
kun dir': Mi plu min bridos se ne ĉesos  
pro tiel longan am' la kurta vivo.  
*Verkis Luis Vaz de Camoens, elportugaligis  
Geraldo Mattos Gomes dos Santos, Brazilo*

### DENOVE ...

Denove revenis la mondon somer',  
De l' viv' resurekto, ekĝoju, profetoj!  
Je ŝvit' kaj parfumoj odoras aer',  
Je vino kaj brando plenplenas glasetoj.

Pro fajroj kaj lumoj taghelas vesper',  
Marĉando, blasfemoj, vendado, aĉetoj,  
Fiŝercoj, muziko, trompad' kaj sincer',  
Jen ies kaŝemo, jen ies impetoj...

Kaj kiam bolegas aŭgusto-monat',  
Kaj min anheligas de l' viv' rapideco,  
La sun' onin fritas sen gut' da kompat',

Mi daŭre esperas feliĉon de l' speco  
De mi aprezata, de l' vera beat':  
Ke iam min trovos kaj savos soleco...

*Paŭlo Mojaev, Krimeo, Ukrainujo, 24-25.08.03*

7

### SONETO

Kato rufa - silenta najbaro  
ĉasas birdoj en densa arbusto,  
sedflugadas apude birdaro,  
suspektanta pri l' kata embusko.

Pacienas la ruza bestio,  
premas sin inter ruĝo kaj flavo  
de l' falinta amaso folia  
kaj solviĝas en ties enhavo,

jen subite elpafas sin fulme,  
jen kontenta ekpaŝas kun predo  
dum venteto forblovas lanugon.

Enviego min boras elfunde,  
ĉar pro ia malklara nekredo  
mi ne povas dissolvi la nunon.  
*Miŝa Bronŝtejn (Bruna Ŝtono)  
06.09.2004, Tiĥvin, S.Petroburgo, Rusujo*

### AL VI, REGINA

Vian blondan hararon kun fervoro  
mi karesos; kaj, al mia flarsento  
alvenos, kiel aroma torento  
de via hararo, flora odoro.

Vian lipojn mi kisos kun amoro;  
kaj, en la malhela nokta silento,  
alvenos al mi la volupta tento  
pro kiu mi dronos en am-langvoro.

Mi, en viaj okuloj min rigardos  
sentante, ke ene tiu spegulo  
vi en ili, mian imagon gardos;

kaj mi, estos ĉiam malliberulo  
tie, kie mia amtorĉo ardos  
eterne en la spegul-senmakulo.

*Alberto Garcia Orive, 2009, Bilbao, Hispanujo*

8

### PREZIDANTO DE UEA



*Probal Dasgupta en Malborko, Pollando*

Mesaĝo okaze de 15.12.2009. Hodiaŭ ni festas la centkvindekjaran datrevenon de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Ni reliefe rimarkas ankaŭ, ke ĝuste tiun ĉi tagon, en la lingvojubilaea jaro 1987, forpasis profesoro Ivo Lapenna kies centjaran jubileon ni ĵus festis, antaŭ nuraj ses semajnoj. La koincido de korifeaj datoj hodiaŭ venigas al krona fino nian jubilean sezonon komenciĝintan antaŭ pluraj jaroj jam en 2005, cent jarojn post la prakongreso en Bulonjo sur Maro. Nun, fine de la jubileado, certe rekaptos sian ritmon nia ordinara ekzisto kiel valanoj. El tiu ordinario ni venis grimpe al la jubilea pinto. Tiu pinto, por multaj el ni, prenis la geografian formon de reiro al la komencpunkto de Esperanto, Bjalistoko! Nun ni reiras al niaj valoj. Kion ni portas kun ni tien? Ĉu la jubileoj ŝanĝis nin? Eble pli bonan konon de la vizaĝoj, kiujn ni atente rigardis en fotaj ekspozicioj kaj per aliaj rimedoj dum la jubileaj jaroj. Tamen, ĉu efektive? Ĉu al niaj grandaj korifeoj ekde Zamenhof ni omaĝantoj ne ŝuldas, ke ni lernu de ili la gravecon de renkontiĝoj de "homoj kun homoj"? Por persone iom konatiĝi kun la situacio rilate la biografiajn informojn, mi serĉis la vikipediojn indikojn, specimene, pri du hazarde elektitaj esperantistoj, kiuj en niaj vicoj rolis kiel ordinaruloj, kvankam ekster Esperantujo ili estis pintaj figuroj, Rudolf

Carnap kaj Joan Mascaró i Fornés. Mi konstatis, ke eĉ broŝuretoj, kiuj prezentus ilian vivon tra esperantista prismo, ankoraŭ ne disponeblas, kvankam ekzistas fontoj por pli bone konatiĝi kun ilia vivo. Per ekstervikipedia vojo mi ekaŭdis, ke la esperantistino Elisabet Abeyà okupiĝis pri la katalunigo de lia anglalingva verkaro. Mi estas certa, ke ŝi ankaŭ helpos plialtigi lian profilon inter la esperantistoj, kaj ke ĝenerale niaj historiistoj kaj biografoj iĝos multe pli aktivaj, se nia komunumo donos iom da prioritato al tiuspeca laboro. Mi tuŝas ĉi tiujn detalojn por tiri vian atenton guste al tiu altkvalita atento, kiun Zamenhof en sia laboro dediĉadis ĝuste al la detaloj. Mi same detal-atente aŭskultos viajn apartajn emfazojn aperantajn en tiu ĉi tago grava al ni ĉiuj, kiujn sendube ĉiu, al si malsame prezentas. Por fini, mi invitas vin kunstari kun mi sub la arbego, kiun kreskigis por ni Lazaro Ludoviko Zamenhof, kaj voti, ke ni profundigos ĝiajn radikojn en nia humo.

*Amike, Probal Dasgupta*

### Z-FESTO EN FOŜAN (ĈINIO)



*Festo de Zamenhof-tago en urbo Foŝan, Ĉinio*

La 15an de Decembro oni festis la Zamenhofan Tagon en la urbo Foŝan (Ĉinio), en la Lernejo Por Porprofesiaj Studoj, kie ankaŭ oni instruas Esperanton al centoj da junaj gelernantoj. La festo konsistis el salutvortoj fare de S-ro Jin Peng, direktoro de la lernejo, de S-ro Lin, prezidanto de la e-asocio de Kantono, kaj de la juna esperantistino Li Fei. Ankaŭ ili parolis pri Zamenhof kaj pri la valoroj de Esperanto. Tuj poste okazis retbabilado inter la gestudentoj kaj la brazila esperantistino Karesema, kaj kun la

franca esperantisto Michel Fontaine. Estis antaŭvidita ankaŭ la babilado kun Neĝeta (Ĉinio) kaj Angel Arquillos Lopez el Malaga, Andaluzia (Hispanio) sed pro teknikaj problemoj ili ne okazis. Fine, ĉiuj en amikeca etoso manĝis kaj trinkis, kaj kompreneble okazis komuna fotado.

Augusto 分发作业

## Z-TAGO EN KANTONO (ĈINIO)



Grupa fotado en Kantono kun vizitantoj el Foŝan La 19an de decembro la esperantistoj de Kantono (Ĉinio), festis la 150-an datrevenon de la naskiĝo de nia Majstro, Doktoro Zamenhof. La kunveno okazis en la sidejo de la loka asocio. Prelegis kaj salutis s-ro Ling, Prezidanto de la asocio, s-ro Petro Ye, aktiva membro, kaj Augusto Casquero de la Cruz, alias **Augusto 分发作业**, profesoro. Multe helpis en la organizado la Ĝenerala Sekretario, s-ro Liu, kaj la juna kaj aktiva esperantistino Li Fei. Ĉiuj aŭskultis atente, kaj ĝuis la prezentadon. Fine, ĉiuj, en amikeca etoso, iris al proksima restoracio, kie oni bankedis kaj amuziĝis. **Augusto 分发作业**

## OKA ĈINA E-KONGRESO

Dum la 3-5a de decembro okazis en la historia ĉina urbo Nankino (ĉina ĉefurbo de la kulturo), ĉe sia plej fama universitato, la 8a Ĉina Kongreso de Esperanto, kun partopreno de ĉirkaŭ 400 esperantistoj de la tuta lando, krom kelkaj

9 el aliaj landoj (Francio, Usono, Japanio, Tajvano, Hispanio, Irano). La programo estis interesa, kun allogaj prelegoj kaj prezentadoj. Ĉefe plaĉis al la ĉeestantoj la vasta uzo de Esperanto, ne nur surkoridore, sed ankaŭ dum la prelegoj kaj oficialaj programeroj, tute malsame de la antaŭa kongreso, antaŭ du jaroj en Kantono, kie praktike ĉio okazis en la ĉina lingvo, kvankam la partoprenintoj bone regis nian internacian lingvon. S-ro Wang, el Shanghai, publike, sur la podiumo, petis ke ekde nun ĉio okazu en Esperanto. Longa aplaŭdo sekvis lian proponon. Se mi devus ion elekti kiel plej interesa kaj alloga parto de la kongreso estis la partopreno de esperantistaj infanoj. Du infanaj grupoj aktive kaj vigle partoprenis. La infanoj de ambaŭ grupoj bele kaj kuraĝe parolis kaj kantis en nia lingvo. La ĉeestantoj restis ege kortuŝitaj. Unu el tiuj grupoj venis de la urbo Zhenjiang, de la provinco Jiangshu, de la lernejo Baotalu, kies instruistino estas Neĝeta (Shi Xueqin), kiu instruas tie Esperanton al la geinfanoj kune kun sia edzo, Michel Fontaine, franco. Ili estas bone konataj kaj eĉ ricevis belan memoran diplomon de Ĉina Esperanto Ligo, pro ilia granda helpo al la disvastigo de Esperanto en Ĉinio.



Infanoj kun Augusto, Neĝeta kaj Michel

Ĉiuj ne nur ĝuis la prezentadojn de la infanoj, sed povis babiladi kun ili. Ili estas ĉarmegaj, kuraĝaj, diligentaj. Dum la dua tago de la kongreso Neĝeta kaj Michel faris kun ili provlecionon, antaŭ la publiko, kiu estis agrable surprizita. En nia esperanta mondo troviĝas multaj teoriistoj de la instruado de Esperanto. Sed ni ĉiuj

10 devus lerni de la instrumentoj de Neĝeta kaj Michel. Vere ili estas talentaj instruistoj, allogaj, kiuj facile komunikigas kun la gelnantoj, kiuj, krom lerni bone, evidente amas tiujn admirindajn instruistojn. Ekde tiu tago mi, malnova instruisto, decidis ke mi devas ŝanĝi miajn instrumentojn, kaj iomete "kopi" de ili.



Augusto 分发作业 instruas en Ĉinio

Dum tiu lekciono okazis ankaŭ reta babilado kun la brazila esperantistino Karesema, ege simpatia, kaj kiu ankaŭ bonege komunikigis kun la infanaro. Bona etoso, feliĉaj infanoj, feliĉaj observantoj.

Augusto 分发作业

## 6A AZIA KONGRESO



19-23 JUNIO 2010 ULANBATORO MONGOLIO

<http://mongolio.info>

## SOMERA ESPERANTO-STUDADO



Partoprenantoj de SES-2009

Somera Esperanto-Studado (SES-2010) okazos inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2010. Jam la tria fizika lernu!-renkontiĝo okazos en okcidentslovaka banurbo Piešťany, situanta 80 km for de la slovaka ĉefurbo Bratislava kaj 160 km de Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio. La programo konsistos: Antaŭtagmeze, instruado de Esperanto; Posttagmeze, ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj; Vespere, nacia kaj internacia vesperoj, koncertoj, filmo-spektado, diskoteko.

Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 4 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo. Pri la lernu!-programeroj zorgos lernu!-teamo. Eblos ĉeesti prezenton pri lernu.net, pri la traduk-sistemo de la paĝaro, vi estos bonvena iam ajn demandi aŭ proponi ion ajn, rilate al la paĝaro.

Novaĵoj por 2010: a) "Flugiloj de malfacila vento" okazos seminario por instruemuloj! Ĉiujn instruemajn E-istojn, kun relative bona E-nivelo (B1-C1) ni invitas ĉeesti la porinstruistan seminarion, sub la gvido de ILEI-spertuloj. La "Flugiloj"-seminario okazas jam ekde la jaro 2003, enkadre de E-aranĝoj. b) **Ekzamenoj** de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER): B1, B2, C1. Eluzu raran eblon ekzameniĝi pri via Esperanto-scio, laŭ la nova komuna eŭropa referenckadro pri lingvoj. c) Seminario de TEJO "Instigi Kreemon", tiu ĉi aktivula trejnado celos instigi freŝan pensmanieron kaj krei novajn ideojn aŭ projektojn. <http://eo.lernu.net/>



## **BENELUKSA KONGRESO**

Flandra Esperantoligo organizas de la 13a ĝis 16a de majo 2010 Beneluksan Kongreson en Antverpeno, kun lingva festivalo. La temo de la kongreso estas "lingva diverseco en Benelukso". Dum la lingva festivalo ni prezentos al vi i.a. la Brabantan, Frisan, Pikardan kaj Valonan lingvojn. Plie ni antaŭvidas nekutiman ekskurson en Antverpeno, nome tra la subtera kanalaro kaj poste reen surtere; kaj biciklan ekskurson al Saeftinghe, belega naturparko, trans la limo kun Nederlando, kaj multon pli. Ni atendas ankaŭ partoprenantojn el ne-Beneluxlandoj! Pliaj informojn pri la kongreso kaj aliĝilon vi trovas en

<http://www.esperanto.be/kongreso/>  
Lode Van de Velde, prezidanto de FEL.

## **MIRAKLOJ EN IRANO**

### **Pri la gastemo en Esperantujo!**

En oktobro mi estis du semajnojn en Irano, kvin tagojn en Teherano kun esperantistoj.

Jam la unua posttagmezo komenciĝis preskaŭ nekredible. Alveninte al la centra busstacio de la urbeo havanta pli ol 10 milionojn loĝantojn mi telefonis al Farmehr Amirdust, prezidantino de IREJO (Irana Esperantista Junulara Organizo), kun kiu mi jam iomete korespondis elektronike, sed ŝi sciis nur tion, ke mi alvenos iam ĵaude. Mi pensis, ke ni babilos iomete kaj poste mi serĉos por mi iun konvenan hotelon, sammaniere kiel mi jam faris plurfoje en aliaj vizititaj iranaj urboj. Farmehr tuj seniluziigis min: pro la religia festo en Teherano preskaŭ ĉiuj hoteloj estas okupitaj. Kiel plej bona eblo ŝi proponis, ke ŝi mem serĉos hotelon por mi, kaj mi retelefonu post 10 minutoj. Sed la unusolan funkciantan telefonon en la proksimo tuj okupis junulino, kiu videble planis tre longan babiladon, kaj mi ne plu havis eblon retelefoni al Farmehr. Post 10 minutoj mi decidis serĉi ie alian telefonon. Havante malmulte da espero mi iradis tien

11

kaj reen sur la teritorio de la busstacio, kiam laŭ la iranaj kutimoj iu alparolis min el la alia flanko de iu florbedo. Ĉar mi nun tute ne havis emon al la rituala babilado "Kiel vi fartas? El kiu lando vi venas?" - malĝentile mi ne reagis, sed daŭrigis la serĉadon. Nur iom poste ŝajnis al mi, ke mi aŭdis mian nomon. Sed kiu povus alparoli min per mia nomo en tiu ĉi urbeo 15 minutojn post mia alveno? Tiu ne eblas! Mi iris plu. Sed mi denove aŭdis mian nomon, kaj ŝajnis al mi, ke iu parolas Esperante. Mi ne volis kredi! Kiel mi poste eksciis, Mohammad Reza Fuladkhah, amiko de Farmehr, venis al mi per la bonega mesaĝo, ke ili trovis hotelon por mi. Kaj tiu esti nur la komenco. Dum la kvin tagoj ili konatigis min kun multaj esperantistoj, mi partoprenis plurajn aranĝojn, renkontiĝojn, kaj povis ekkoni la vigan Esperanto-vivon en Teherano. Mi estis invitata al s-ro Parviz Habibpur por partopreni la honoran kunvenon dediĉitan al la unua datreveno de la forpaso de s-ro Aref Azeri, mi partoprenis la lingvokurson de s-ro Mehdi Zargaripour, povis iomete enrigardi la laboron de la oficejo de sinjoro Reza Torabi, babiladi kun vizitantoj, kaj ekskursi kun entuziasmaj kaj scivolemaj junaj esperantistoj. Kiam ne estis grupa programo, venis al mi s-ro Mehdi Zargaripour, s-ro Ebadollah Mokaddasi aŭ s-ro Reza Hassan Lou, kiuj montris al mi diversajn vidindaĵojn de la urbo kaj dume rakontis al mi pri interesajoj de la irana vivo. Oni ĉie akceptis min nekredible amike. Kvankam tio estis por mi en Esperantujo parte kutima, sed la irana akcepto superis ĉion ĝis nun spertitan. Oni ne senbaze diras, ke la irananoj estas unu el la plej gastamaj nacioj de la mondo! Nun laŭ miaj spertoj ankaŭ mi povas aserti ĉi tiun. Mi sincere proponas al ĉiuj veturemaj, interesiĝantaj, scivolaj esperantistoj viziti tiun ĉi amikan, varmkoran, ankaŭ je Esperantistoj riĉan landon.

Verkis Otmár Járeb, Budapeŝto, Hungarujo  
Kolektis Germain Pirlot, Oostende, Belgujo

12

## **PLENE FUNKCIANTA LINGVO**

En sia populara libro pri lingvaj mitoj, la sveda lingvisto Mikael Parkvall atakas ankaŭ la aserton, ke Esperanto ne estus plenvolara lingvo. Li mem ne estas esperantisto, sed defendas la lingvon kaj la ideon kun entuziasmo, kiu povus igi tiun aŭ alian kabeemulon ruĝiĝi kaj duonvoĉe plendi pri "diablaj idealistoj". Li atentigas, ke kvin sesonoj el la monda loĝantaro ne scias la anglan. Subtenantoj de la angla anstataŭ Esperanto laŭ li implicas "ke internacia lingvo, precize kiel hodiaŭ, devas esti privilegio de elito."

## **LANDO DE INVENTITAJ LINGVOJ**

Stranga afero pri esperanto estas la fakto ke iu ajn povas havi fortan opinion pri ĝi, ĉu li scias ion pri ĝi ĉu ne. Lingvistoj ne farus tiel pri la latina, sanskrita aŭ hispana, sed multaj el ili ne hezitas fari tiel pri esperanto, konstatas Gunnar Gällmo en sia recenzo pri la verko "In the Land of Invented Languages" de Arika Okrent. Tiurilate la aŭtoro laŭ li estas raraĵo, ĉar ŝi ne estas esperantisto, sed profesia lingvisto, kiu tamen prenas la aferon serioze, kaj faris surlokan esploradon en kunvenoj de esperantistoj kaj klingonistoj antaŭ ol ion konkludi.

## **FANTOMAJ ESEJ HANTAS RETON**

Klingono havas pli da parolantoj ol Esperanto. En Ĉinio Esperanto estis malpermesita, post kiam la konata lingvisto Qian Xuantong proponis, ke oni anstataŭigu la ĉinan lingvon per Esperanto. La angla lingvo aliflanke absorbis la plej bonajn ecojn de aliaj lingvoj, inkluzive de eroj el aziaj skribsistemoj. Pri tiuj kaj aliaj parte aŭ tute elpensitaj faktoj oni supozeble povus legi en la interesa verko "Language Development" de Gary Dawson - se ĝi ekzistus ankaŭ aliloke ol en la fantazio de la anonima verkinto de la reklama eseo "Kial Esperanto ne iĝis grava lingvo". Toŝo del Barrio esploris la vendadon de trompaj esejoj.

Libera Folio

## **LITOVIO: PRI GOOGLE KAJ LERNU!**

Ne nur esperantistoj, sed ankaŭ Google solenis la 150-an naskiĝdatrevenon de Zamenhof. La plej potenca serĉilo de la mondo videbligis la Esperantoflagon en sia logotipo, kaj pro tio ni havis multege da vizitantoj, kion kompreneble ni multe ŝatis, sed nia servilo ŝajne ne . :-)

Feliĉe ĝi tamen transvivis, se nur kun granda peno. Averaĝe *Lernu!* havas ĉiutage ĉirkaŭ 5000 unufojajn vizitantojn, hieraŭ ni ekhavis preskaŭ 29.000, do sesoble pli ol kutime. La Esperanto-flago ne plu aperis, sed *Lernu!* kontinuas havi multe da vizitantoj. Danke al Google nun dise en la reto aperas multegaj artikoloj pri la hieraŭa okazaĵo. Multaj retgazetoj, blogoj kaj forumoj aperigis informojn pri la reklamaĵo, Esperanto kaj Zamenhof. Hodiaŭ ni plej verŝajne ne atingos novan rekordon pri unufojaj vizitantoj, sed ŝajne ni havos alian – la plej altan nombron da vizititaj paĝoj en unu tago. Averaĝe la vizitantoj rigardas ĉe *Lernu!* ĉ. 90.000 paĝojn ĉiutage, hieraŭ oni vizitis ĉ. 130.000 paĝojn. Sed hodiaŭ ni jam havas preskaŭ 150.000 paĝojn, kaj ĝis la noktomezo restas ankoraŭ multaj da horoj! Do ŝajne uzantoj kiuj venas hodiaŭ, restas ĉe *Lernu!* dum pli da tempo kaj trarigardas pli da paĝoj ol la uzantoj kiuj venis hieraŭ. Nun nin vizitas homoj kiuj legis pri Esperanto kaj pro interesiĝo revenas al nia paĝaro. Hieraŭ estis informtago, hodiaŭ estas tempo por varbado.

Jevgenij Gaus, 16.12.2009  
"La Ponto" retrevuo de Limburga E-Asocio

## **ESPERANTO ESTAS PARAZITO?**

### **La verkistoj:**

Estas sendube grave ke ekzistis ekde la komenco de nia lingvo homoj, kiuj volis kontribui al la literaturo de Esperanto. La originalaj poemoj, originalaj romanoj (ĉefa inter kiuj estas "La Granda Kaldrono" de John Francis), tradukitaj prozaĵoj kaj tradukitaj poemoj altigis nian lingvon. Per la vasteco kaj altkvaliteco de la esperanta literaturo ni povas pruvi ke nia lingvo ne estas frivola fantaziado de lerneja knabo, sed egalas en esprimpovo la grandajn

lingvojn de la mondo. Ĝi kapablas esprimi la tutan gamon de homaj spertoj de la plej mornaj ĝis la plej amuzaj. En situacio kiam oni havas ŝancon argumenti por Esperanto la vasteco kaj la kvalito de niaj originala kaj tradukita literaturo estas forta armilo. Nia literaturo, kompreneble, gravas en si mem, ĉar ĝi pliriĉigas la sperton esti Esperantisto, sed ĝi ankaŭ gravas por propagandi la lingvon mem.

### La Eventoj:

Ankaŭ gravaj por la riĉigo de la vivo esperantista kaj por levi la vizaĝon de Esperanto antaŭ la publiko estas la eventoj kiuj okazas, kaj en, kaj ekster la esperantista kalendaro. La kongresoj internaciaj kaj naciaj, lokaj kaj pli grandaj; kunvenoj, festoj, vizitoj de eksterlandanoj estas ŝancoj por montri konkrete ke Esperanto ekzistas kaj funkcias. Tiuj, pli grave, kuraĝigas nin kiel Esperantistojn. La sperto uzi Esperanton ne nur inter ni en klubo de samlingvanoj, sed kun homoj kies denaskajn lingvojn ni aŭ ne kapablas aŭ nur balbute kun malfacilo povas paroli, estas pruvoj al ni mem ke ni trovis en nia lingvo ion valoregan, kun praktika uzo, kiu povus multe helpi la ceteran homaron. Kiam ni konsideras la grandan povon de la angla lingvo, kaj post ĝi la povon de la ĉina, de la hispana, la germana, la franca, kaj komparas ilin kun la relativa malforteco de la Esperantistoj . . . kaj opinias nin frenezaj . . . la esperantaj eventoj kaj kontaktoj reĝojigas nin. Ili revarmigas la koron kaj fortigas la konvinkon; ili redonas al ni esperon pri Esperanto.

### La Kampanjoj:

Fojfoje dum la jaroj ekokazas propagandaj kampanjoj tre ofte je la nivelo de lokaj grupoj kaj tre ofte je la instigo de unu persono entuziasmega aŭ de malgranda aro da entuziasmaj homoj. Oni starigas standon portantan, en publika loko, librojn kaj flugfoliojn, kaj klare videbligas al la publiko la verdan esperantan stelegon. Aliaj varbocelaj kampanjoj ne celas laŭtan krimon ĉe placangulo sed pli kviete kaj

konstante almontas afiŝojn en bibliotekoj, lasas flugfoliojn sur tabloj, reklamas pri kursoj en lokaj gazetoj, kaj ĝenerale celas informi kaj eduki la publikon pri la ekzisto kaj daŭra vivado de Esperanto. Kvankam tre gravas meti antaŭ la okulo de la publiko kiel eble plej ofte la nomon "Esperanto", ĉar sen tio ni tute malaperus el la popola konscio, estas dubinde kiel efika estas tia laboro. Kioman procentan rikolton havis la movado per tia labora, tempa kaj, ni ne forgesu, mona elspezo?

Tamen ni devas fantazoni pri la valoro de la lingvo, pri la avantaĝoj de Esperanto super la naciaj lingvoj kiel interlingva lingvo; ni senĉese levu la standardon por ke homoj sciu ke alia ebleco ekzistas.

### La Interreto:

Kuraĝiga estas la kreskanta nombro da Esperantistoj, ne nur junaj, kiuj aktivis en la reto. Nu, estas dubinde ĉu la kampanjo kiu okazis antaŭ kelkaj jaroj por instigi retajn Esperantistojn submeti sian voĉdonon en retan enketon estis meritinda. La rezulto estis ke Esperanto aperis kiel la dua plej populara lingvo en la reto post la angla. Sed estas fakto ke multaj, precipe junaj, Esperantistoj lernis per retaj kursoj. En la somero pasintjare okazis en Modra Harmonia, en Slovakio, dum la Somera Esperanto-Studado la unua malvirtuala renkontiĝo de lernintoj de Esperanto per la reta kurso Lernu!. Ĉeestis 105, el kiuj almenaŭ duono estis Lernu!-lernintoj. Povas esti ke la reto estos la savonto de Esperanto!

### La Agado de UEA:

Gravas por la pluenigo de nia afero la laboro, kiun faras UEA ĉe la plej altaj instancoj. En 1954 Ivo Lapenna grande sukcesis ĉe UNESKO, kaj ekde tiam ni havadis konsultajn rilatojn kun UNESKO. La nuntempa Prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, en aprilo 2008 reprezentis UEA-on kaj prezidis kunvenon dum simpozio pri lingvaj rajtoj en la ĝeneva sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj. Partoprenis aliaj ne-registaraj agentoj .... do ne temis pri kunveno de la registaraj reprezentantoj

... sed tamen la faktoj spegulas kiel alte taksas UEA-on la UN.


Oni devas daŭre agi je tiuj plej altaj niveloj por ke, iome post iome, la registaroj mem rekonos la gravecon de Esperanto.

### La Sukceso:

Ĉio ĉi gravas. Neniel oni diru ke ĉio ĉi ne gravas. La verkistoj, la vortaristoj, la informadistoj, la lokaj entuziasmoj, la kluboj, la gravuloj en nia plej alta instanco, ĉiuj gravas. Ni minimume daŭrigu tion kion ni jam faradis.

Sed ĉu la movado kreskas? Ni rigardu ioman evidencon. La suba grafikaĵo montras la nombrojn da ĉeestintoj ĉe Universalaj Kongresoj de la unua ĝis tiu de 2007.

### Vi bonvolu rigardi la bildon:



La tendencindika linio montras ke la aliĝonombro al UK-oj kreskas averaĝe po 11.67 homoj en ĉiu jaro. Tiu ebligas la kalkulon ke post 200 jaroj la averaĝa ĉeesto en UK-oj nombros 4660 homojn. Tio estas: ĝi duobliĝos. Se ĝi iel spegulas la nombron da Esperantistoj en la mondo ni povas supozi ke tiu ankaŭ duobliĝos post 200 jaroj. Mi konjektas ke estas ĉirkaŭ 60 000 da Esperantistoj hodiaŭ; do post 200 jaroj ni nombros 120 000 da.

Ĉu tempo venis por trovi novan taktikon?

### La Brazilano:

Dum la UK en Roterdamo prezentis sin al mi apud sia stando en la ĝenerala halo de la kongresejo Brazilano kiu disdonadis flugfoliojn pri sia entrepreno. Laŭ sia klarigo li starigis kompanion specife pri investado en nemoveblaĵojn en Brazilo kaj volis per Esperanto disetendi la komercon al kie ajn en la mondo. Mi tuj havis intereson, ĉar dum multaj jaroj mi pripensadis la eblecon starigi komercon en kiu Esperanto ludas gravan rolon. Mi rezonis ke, se oni povus sukcesan internacian komercon ekigi, homoj ne-esperantistaj rimarkus ĝin kaj volus lerni pri la sekreto de la sukceso. Se Esperanto havus krizan rolon en la afero, ekzemple ebligantan ke kompanianoj en malsamaj landoj povus facile intertrakti unu kun la

alia sen bezono de interpretisto, homoj vidus sufiĉe fortan motivon lerni la lingvon por ĝin same efike ekspluati. Tiu Brazilano simile rezonis sed li havis plian motivon. Li konsideris la Esperantistaron la grundon de lia sukceso; li ja volis sukcesigi la kompanion kaj riĉiĝi per ĝi, tio estas: la famo kiun Esperanto ĝuus per la sukceso de lia kompanio estus nur flanko, kvankam feliĉiga, motivo por li; li konstatis ke per Esperanto li povus allogi investojn de ĉie en la mondo kaj ankaŭ ebligi al

Brazilanoj investi en eksterlandaj merkatoj. Jen lia unua kompanio.

Sed aldone al tio ĉi li starigis agentejon laŭ la nomo Intraespo, kies celo estas stimuli esperantan ekonomion en kampoj tute ne-rilataj al nemoveblaĵoj; per la helpo de interesitaj kaj laboremaj Esperantistoj li volas starigi filiojn de sia ĝenerala kompanio Intraespo en tre disaj partoj de la mondo, enirante promesoplenajn merkatojn kaj tiel helpante la kreskon de la ĝenerala esperanta ekonomio. Mi citas ĵen el lia flugfolio "Por ke lingvo disvolviĝu, necesas, ke ĝi vigle manifestiĝu en ĉiuj branĉoj de homa agado .... la hebrea lingvo nur lasis sian staton de duonmortinta al viveganta lingvo kiam ĝi fariĝis integra parto de la disvolvado de lando kaj la popolo, kiu ĝin denaske parolas, kun forta aktivado en la ekonomio, kulturo, edukado, turismo, scienco kaj teknologio. Por plene disvolviĝi, konsiderante la respektivajn diferencojn, Esperanto devas sekvi la saman vojon."

### **La Nederlandano:**

Dum la sama UK mi ĉeestis ne-oficialan prelegon, dum la tiel-nomata "Libera Podio". Mi aliris al tiu sesio ne sciante kiu parolos (ĉar ĝi estas libera podio). La gvidantino starigis kaj petis iujn kontribuantojn, sed (eble pro la ŝafa sperto dum la hieraŭa sesio) antaŭ ol povus prezenti sin spontana volontulo, ŝi enkondukis antaŭe aranĝitan prelegon. La titolo estis "Nederlando kiel centro de monda komerco", titolo kiu ŝajnis al mi tre seka ... sed mi estis jam en la ĉambro kaj ne povis eskapi. La maljuna viro kiu starigis prezentis efektive fascinan horon dum kiu li spicigis prifaktan prelegon pri la historio de la nederlanda komercemo per anekdotoj pri veraj homoj kaj ties vivoj en la historio. Unu interesa fakto estis ke la Japanoj, kun kiuj la Nederlandanoj komercis dum 400 jaroj, lernis la nederlandan por trakti kun ili. Kiam venis Usonanoj al Japanio, la Japanoj alparolis

15  
al ili en la nederlanda, pensante ke ĝi estas la lingvo de ĉiuj blankuloj!



Hju Rid

Post tiu prelego ekis la lampo en la kapo! Oni samtempe prezentis dum la kongreso prelegojn pri Rembrandt. Mi memoris notitan fakton de historiistoj kaj ekonomikistoj ke la kreskon de ekonomio de iu lando tre ofte akompanas burĝono de belarta kaj beletra aktivo. Rembrandt vivis dum la hegemonio de la Nederlanda Orient-Hindia Kompanio. En Anglio, oni memoru, ke Ŝekspiro aperis en tempo de floranta angla komerco kaj la naskiĝanta kapitalisma sistemo. Jen mi citas el la "Traktado pri Mono" de John Maynard Keynes: "Ni ĵus venis en financan pozicion por mone elteni Ŝekspiron, en la momento kiam li aperis. Mi proponas kiel tezon por ekzameno, ... ke, je granda marĝeno, la plejmulto de la plej bonaj verkistoj kaj artistoj de la mondo floris en la atmosfero de leviĝo, ekscito, kaj libero forde ekonomiaj zorgoj sentataj de la regaj klasoj, kiun kaŭzas profit-inflacio."

Kiam plinombriĝas la riĉuloj kaj mezklasuloj en ia socio, kaj la socio mem pli ĝenerale bonfartas, homoj disponas je pli da libertempo por ĝui artajn aferojn kaj pli da mono por elspezi super ili. En tia tempo indas al talentohava persono dediĉi sian energion kaj tempon al la perfektigo

16  
kaj produktado de siaj artaĵoj. En malriĉa primitiva socio nek Ŝekspiro nek Rembrandt povus aperi, ne pro tio ke primitivuloj ne estas inteligentaj sed ĉar ilia ekonomio simple ne povus vivsubteni ulon kiu malŝparas sian tutan energion por arto.

Estas pro tio ke mi volas nomi Esperanton parazito.

### **La Parazita Planto:**

En Esperantio ni havas la poetojn kaj romanistojn, ĉiaspecajn verkistojn, ni havas kantistojn kaj muzikistojn; ni havas kunvenojn kaj kongresojn kun multaj prelegistoj (ne forgesu ke bona prelego estas artoformo!), ni havas la gravulojn kaj la organizojn, ni havas UEA-on, kvazaŭan registaron ... ĉiujn superstrukturojn de normala lingva ekonomio sen havi la subtenan substrukturn: la ekonomion mem. Esperanto estas kiel parazita planto kiu faras florojn kaj foliojn per la suko de alia planto. Ĝi havas radikojn kiuj penetras la tigon de la pli forta planto. Ĝi ne havas radikojn kiuj povas penetri la grundon por eltiri krudajn nutraĵojn el la humo per la helpo de nitrofiksaĵ bakterioj.

Ni estas tia. Ni havas la florojn, kaj ili belas. Ni havas la foliojn, kaj ili verdas. Sed ni ne havas engrundajn radikojn.

Konsideru; ĉion faritan de Esperantistoj en Esperantio ili faras per mono gajnita el la ekonomioj de aliaj lingvoj. Mi ne parolas, kompreneble, ĉi tie pri la etaj internaj ekonomioj de niaj asocioj kaj kongresoj. Ni pagas kotizojn, ni aĉetas librojn, kartojn, stelojn. Sed tia ne estas forta burĝona ekonomio per kiu multaj homoj vivsubtenas sin; kaj krome ĝi estas tute priesperanta..

### **Ekzemplo de la Angla:**

La angla lingvo estas nun la defakta internacia lingvo. Pri tio oni simple ne povas argumenti. Oni ja povas argumenti ke la nivelo kaj esprimkapablo kiujn atingus homo studinte la anglan dum du jaroj estus malpli ol tiuj, kiujn atingus samkapabla homo studinte Esperanton dum la sama periodo. Oni povus, sed ne

gravas. Oni povus argumenti ke Esperanto traktus egale ĉiujn partopranantojn en internacia konversacio, ĉar ĝi estas nenies denaska lingvo. Oni povus, sed ne gravas. Oni povus argumenti ke Esperanto ne altrudas la kulturon de unu lando, kiel faras nacia lingvo, sur la lerninton. Oni povus, sed ne gravas. Ne gravas, ĉar la granda plimulto da homoj neniam aŭdis pri Esperanto. Ne gravas, ĉar eĉ se la granda plimulto da homoj en la nacioj ja jam aŭdis pri Esperanto kaj plene komprenus la avantaĝojn kiujn ĝi ofertus, ili ne elektus ĝin kiel studobjekton, ĉar la angla estas jam la defakta internacia lingvo.

Mi estas ĵus reveninta de ferieto en Germanio por viziti la boparencojn. Unu el la pli aĝaj nevinoj lernas la anglan lingvon kaj sufiĉe bone sukcesis laŭ takso de la retmesaĝoj kiujn ŝi jam sendis al mia edzino por korektado kaj tradukhelpo. Sed ŝi ankoraŭ ne multe parolis ĝin. La patrino informis nin ke ŝi baldaŭ estos devigata, tamen, paroli la anglan, ĉar oni aranĝis viziton al ŝia hejmo de hispana junulino.

Tiu ne parolas la germanan; la germana nevino ne parolas la hispanan. Ili ambaŭ tamen lernas la anglan. Do ĉio estas enordo. Kaj tio ĉi ne estas unuopa okazaĵo. Ĝi okazas ne prikalkuleble ofte, malgraŭ la pretendo laŭ la sceno priskribita de Bill Auld en sia libro "La Fenomeno Esperanto" ke la angla ne kapablas kiel internacia lingvo, kaj do grupo, vidita de li, de malsamnaciaj gejunuloj renkontiĝinta sur plaĝo baldaŭ disiĝis en silentiĝanta embaraso. La angla ja kapablas kiel internacia lingvo en la nuntempo kaj jam multfoje en la pasinteco.

Ni estu realismaj pri tio ĉi, kaj ni evitu ĉian revemecon. Mi legis en Update raporteton pri tio ke Stephen Fry, dum la programo televida QI, menciis Esperanton kaj eĉ legis sufiĉe bone kelkajn frazojn en Esperanto. Sed ni konstata ke tiu mencio okazis en la kunteksto de la "interesa fakto" ke ĵusa studo universitata



prognozas ke, laŭ la nuna kresko, post 30 jaroj ĉiuj en la mondo parolas formon de la angla lingvo. Ni ankaŭ konstata ke en la programo protestis kontraŭ tiu ĉi aserto neniu.

Kaj kial la angla tiom regas? Ĉu temas pri ia beleco de la angla lingvo? Ĉu temas pri ia facileco de la angla? Ĉu temas pri ia allogeco de ĝia ĉarme freneza ortografio? Fakte, temas entute pri nenia trajto de la lingvo mem. Temas pri la hazardo ke ĝi estas la lingvo de la pli riĉa lando en la mondo. Ĝi estas la lingvo de la "pli riĉa najbaro".

Dum la homa historio antaŭ ol la formiĝo de la nacioj dulingveco ne estis tre malofta, ĉar homoj devis trakti, por la interŝanĝo de varoj ktp., kun homoj el alia tribo kies lingvo estis alia. La emo do estis lerni la lingvon de la plej riĉa najbaro por komerce ricevi iom da ties riĉeco. Hodiaŭ, je monda skalo, la plej riĉa najbaro estas Usono ... antaŭ ol baldaŭ kreskos Ĉinio, kaj ties lingvo fariĝos la monda!

### **Ekz. Infanoj de Enmigrintoj:**

En sia libro "How the Mind Works" ("Kiel Funkcias la Menso") Steven Pinker priskribas la jam sufiĉe bone konatan fenomenon de infanoj de enmigrintoj en iun landon. Gepatroj tiaj ofte rimarkas pri kiel rapide la geinfanoj ensorbis la lingvon de la nova lando, dum ili mem luktas ĉiutage orienti sin en la nova lingva medio. Judith Rich Harris en sia libro "The Nurture Assumption" ("La Eduka Supozo") priskribas postan, ne tiom raportitan fenomenon, ke la geinfanoj popaŝe enportas la eksteran lingvon en la hejmon, kaj ofte finfine rifuzas paroli la lingvon de la gepatroj eĉ en la hejmo. Pinker kaj Harris klarigas la fenomenojn evoluaj kialoj. La geidoj instinkte scias ke por sukcesi en la vivo, tio estas por trovi parolon, por finfine naski sian proprajn idojn, kaj por vivsubteni sin kaj siajn eventualajn idojn la lingvo de la lando absolute necesas. La gepatra neniel utilas. La idoj ne pensas pri la afero; la instinkto faras la decidon, kaj krome inter

la aĝoj du ĝis dek-du jaroj la homa cerbo estas tiel aranĝita por rapida lerno de ofte aŭdata lingvo preskaŭ sen konscia peno. Se ni volas ke Esperanto estu lernata de normalaj homoj, ni malfermu la okulojn kaj ni agnosku tion kio motivigas normalajn homojn lerni lingvon. Ni scias ke belaj vortoj pri neŭtraleco kaj lingva justeco inspiras homojn kaj tuŝas ties idealismajn sentojn, sed tio kio motivigas ilin estas multe pli konkreta kaj ordinara. Temas pri vivsubteno, pri mongajno, pri kariero, eĉ pri riĉiĝo.

### **Kial Homoj Priridas Nin:**

Mi suspektas ke jen ni vidas la tialon, kial homoj pensas pri Esperanto kiel frivola priridinda afero, eĉ se tiuj majoritate mem ne komprenas kial. Homoj demandas "kiuj parolas la lingvon?", "kiom da homoj parolas ĝin?", "ĉu la angla ne estas la internacia lingvo?", aŭ ili asertas "ĝi ne havas literaturon", "ĝi ne havas komunumon". Subkonscie, tamen, ili instikte komprenas ke ĝi ne estas kiel aliaj lingvoj ĉar ĝi ne estas perilo de vivanta ekonomio. Kaj kun ili mi tute konsentas. La ekonomio estas la fundamento de ĉiu socio. Se Esperanto ne estas perilo de vivsubtena ekonomio ĝi ne estas konsiderinda, ĝi ne estas vera lingvo kiel la naciaj lingvoj.

Jen, do, kion ni bezonas: ekonomion funkciantan per la lingvo Esperanto kiel aferista lingvo, intervendantan NE-esperantajn varojn tra la tuta mondo, kaj profitantan per la efikeco de Esperanto por tratranĉi kaj flankenŝovi la malneprajn lingvajn komplikajojn de la moderna mondo.

### **Sed Ion Plian:**

Pri tio mi tute konsentas kun la brazila samideano en Roterdamo, sed mi dirus plion. Ni devas ankaŭ lerni de la nederlanda ekzemplo (aŭ de la angla kaj aliaj). La Nederlandanoj ne provis lernigi la nederlandan lingvon al la Japanoj per la promeso ke poste ili komercos! Ili tuj proponis vendojn kaj aĉetojn kaj pro la furora sukceso de la kreskanta ekonomio

inter ili la Japanoj lernis propravele la nederlandan. Ni komercu unue, uzante Esperanton kiel perilon, ne propagandante ĝin, sed simple profitante per ĝi, kaj poste la ne-Esperantistoj altiriĝos. Esperanto fariĝos la lingvo de tutmonda komerco *kiam ĝi fariĝos la lingvo de tutmonda komerco*. Tio estas, ni ne atendu ke internaciaj komercistoj adoptos Esperanton, ni devas fariĝi komercistoj per Esperanto kaj nia komerca sukceso kaptos la atentojn de la ceteraj komercistoj.

### **Ekz. Esperanta Kompanio:**

Kiel? Nu, mi laboris dum ses jaroj en la kompanio Ferranti kiel inĝeniero pri laseraj aparatoj. Kompreneble ĉiajn intertraktojn oni faris en la angla lingvo. En normala tago mi parolis kun desegnistoj, kun maŝinkonstruistoj, kun materialprovizantoj, kun eksteraj kompanioj por kontrakti specialismajn taskojn, kun la estro, kun kolegoj, kaj kompreneble kun la klientoj. Unufoje ni provis kun franca firmao aranĝi kunlaboron, finfine sensukcesa. Mi memoris kiel malfacile estis fari eĉ la plej simplajn laborojn pro la lingva diferenco. Ni traktis plejofte kun unu ĉefinĝeniero kiu bone scipovis la anglan. Ĉiujn demandojn oni devis direkti al li, eĉ se la demando ne rekte koncernis lin.

Memorante tion ĉi, kaj fariĝinte Esperantisto mi de tempo al tempo pensis pri kiel Esperanto povus solvi la problemojn kiujn mi tiam spertis. Mi imagis kiel, se ĉiu laboranto je kiu ajn nivelo en kompanio regus Esperanton, tiu povus rekte trakti kun la taŭga homo en alia kompanio senkonsidere ĉu en Francio, ĉu en Germanio, ĉu en Ĉinio. Mi plue revis pri internacia kompanio kiu komercus kie ajn tra la mondo, kies kompanianoj estus ĉiuj Esperantistoj, kaj do povus per telefono, per retmesaĝo, per skajpo aŭ televidea konferenco senĝene efiki siajn ĉiutagajn laborojn por la kompanio, komunikantaj kun la taŭgaj homoj tut-samkiel mi faris per la angla en

anglalingva kompanio. Mi imagis ke, ĉar oni havus integriĝintan firmaon kiu funkcius sen la kutimaj miskomprenoj pro lingvo, sen speciala trejnado por tiuj firmaanoj kiuj devas labori kun eksterlandaj samkompanianoj, kaj sen la altaj salajroj de primadonaj interpretistoj, ĝi povus havi ekonomiajn avantaĝojn super aliaj kompanioj konkurantaj en la sama sfero. Tion mi revis.

Sed nun mi asertas ke ne plu temas simple pri alia tereno en kiu Eo povus helpi, sed ke ĝi estas la tereno en kiu Eo devas sukcesi por ke niaj revoj esperantistaj havu ian ŝancon de realiĝo. Mi aldone asertas la jenan: se ni ne povas *elpensi* esperantolingvan kompanion internacian kiu povus riĉiĝi super tiuj, kiuj uzas la anglan ni povas esti certaj ke Esperanto neniam venkos.

### **Konkludo:**

En konkludo: jes, ni faru ĉion, kion ni ĝis nun faradis, kaj ni povos esti komforte certaj ke la lingvo kreskos mondscale (sed ne en Skotlando), kaj ni povos prognozi ke post 200 jaroj la Esperantistaro nombros ĉirkaŭ 120 mil da homoj, tio estas ke ĝi duobligos ... ne sufiĉaj, ĉu ne, por ŝanceli la mondon! Tioma ne estos la sukceso kion ni atendas.

Verdire, se Esperanto ne malparaziĝos, ĝi ne havos la venkon pri kiu ni revas.


Anstataŭigi la anglan kiel la lingvon de komerco estas, ni konstata, grandiozega ambicio kaj niaj ĝuindaj naciaj kongresetoj kiam ni amuziĝas kaj babilas kaj parolas kun karaj amikoj kaj faras decidojn pri la venonta jaro ŝanĝos nenion. Eĉ la Universalaj Kongresoj kun ĉia sia prestiĝo ŝanĝos nenion! Se ni ne starigas konkurencon ekonomion serioze akran kiu kapablos minaci tiujn de la nacioj, Esperanto restos kio ĝi nun estas: plezura flankokupo de ĉarmaj elcentremuloj.

Referencoj:  
Steven Pinker, 1997. *How the Mind Works* p 450. W.W. Norton.  
Judith Rich Harris, 1998. *The Nurture Assumption* pp 64 - 65, p 68, pp 188 - 192. Bloomsbury.


Hju Rid <hju\_rid@yahoo.co.uk>

Prelego dum 104a Kongreso de Esperanto-Asocio Skotlanda, en urbo Dundee 5-7.06.09, fotoj: <http://xurb.freehostia.com/607/>





LUCIEN MICHAUX



03/06/2009

Kunlaboranto de Aktuala kaj progresanto en la kurso de EBG